

JEN-bulteno

NOVJARO. 1976 bedaŭrinde-malofta eldonajo de
Junularo Esperantista de Nord-Ameriko


PREZENTA NOTO DE LA REDAKTANTO

Vi legas la unuan numeron (sed esperinde ne la lastan) de la plej nova generacio de familio almenaŭ dek kvin jarojn aĝa. Iam ĉirkaŭ 1960, fondiĝis organizaĵo, kies impona nomo troviĝas tuj super ĉi tiu noto; kaj post nelonge fondiĝis ankaŭ ĝia Bulteno. Tiu prapatra Bulteno aperadis (se memoro ne trompas min) dum pluraj jaroj, sed ĉesis pro manko de tempo, aŭ de volo, aŭ de intereso.

Almenaŭ unu fojon post tiam, nova JEN-Bulteno naskiĝis kaj poste mortis. (Eble mi diru "vekiĝis" kaj "endormiĝis"; sed mi ne forlasu mian metaforon.) Mi ne scias, ĉu ĉi tiu estas la tria generacio aŭ la kvara, aŭ eĉ kvina; do ĝi restu sen numero, simple datita Novjaro 1976 (la dato estu bonaŭgura!). Ĝi plu aperos laŭ povo. La ĉefa kondiĉo estas:

E N H A V O

Do nutru ĉi tiun infanon. Ne lasu ĝin morti pro malsato. Manĝigu ĝin je viaj skribaĵoj, aŭ eĉ desegnaĵoj. Ne timu, ke ĝi ne digestos vian stilon aŭ gramatikon; la redaktanto povos dispreni ĝenajn bulojn, kaj igi la materion iom pli mola aŭ glata, se tio necesos. La buŝo de la infano troviĝas: ĉe Mark Mandel, 854 Riley Drive, Albany, Calif. 94706.




du poemoj
de Lisa Tauxe

kaj falas la neĝo,
(kaj briletas fore lumoj
en la kreskanta krepusko)
silente
rapide
plenumanta sian celon.
sen ekscito
la neĝo venas
por kovri cikatrojn
de l' homaro.
falanta ludante
blovita de venteto,
ĝi drapiras
la mondon
kaj remburas
akrajn stratojn
kaj konkretajn konstruaĵojn.
egaligas maizkampon
kaj aŭtoŝoseon.
vento, glacio, kamp', kaj flor',
ĉio estas egala,
netuŝita,
belega
kaj preta por la novtago.

ne forgesu rememori!
(la vivo estas "saluton" kaj "ĝis")
ke la universo kurbiĝas
kaj dioj estas mortaj
por ne diri enterigitaj
kaj la HOMO (bravulo) regas
juste,
(linĉamasoj?)
saĝe,
(viet nam??)
kaj
ĉio estas en ord'
(ekonomio???)
?
kaj la homaregneto
devas miri.
ĉu ne?

GUTOJ MALGRANDAJ

proponitaj aldonaĵoj al nia lingvo
konstante frapigataj
de Timothy Ryan
kaj Brian Burg



Lingvistikaj taksonomoj havas sterilan nomon por ili: "neologismoj". En naciaj lingvoj "neologismoj" estas tute akceptataj eroj de la normala procezo de lingva ŝanĝiĝado. La mondo ŝanĝiĝas, la homoj plivariĝas, kaj ankaŭ iliaj vortoj, iliaj komunikiloj, plimultnombriĝas por reflekti tiujn ŝanĝiĝojn. Sed en Esperanto, proponitaj aldonoj ĉiam ricevas multe da kontraŭstaro de iuj Esperantistoj pro la ŝajna rigida, fiksita karaktero de nia lingvo. Ĉiu radiko havas nur unu signifon, ĉiu litero nur unu sonon, ktp. Sed kreitas* nur gramatika kaj fonetika rigideco, kiu estas dezirinda por faciligi la lernadon kaj por belsonigi nian lingvon; kaj estas tute sofisme trudi tian surfacan neflekseblecon kontraŭ facileco kaj libereco de esprimado. Tian nocion ege kontraŭbatalus la Majstro. La ideo de novaĵ-enkondukado, de-homa kreado de por-homaj vortoj, estas baza tradicio de Esperanto; kaj mi neniel povas pensi ke Zamenhof volus, ke kvindek naŭ jarojn post lia morto, la uzantoj de lia lingvo elpelu ĉiun kontraŭbatalon al ĝi, kiu ne povus absolute

* La steleto (*) signas radikon aŭ vorteron, kiu estas eksplikata en la subaj proponoj. (N.de la R.)

dokumentigi kiel lia originala kreaĵo. Tiu karcerlingva pozicio tamen vaste troviĝas en Esperantujo, sed feliĉe por la lingvo ĝi ankoraŭ ne superis inter la Esperantistoj. Esperanto ne estas tabue netuŝebla donaco de la dioj, sed vivanta, spiranta organismo pli granda ol la sumo de siaj eroj. Ni ne frivole kaj spasme faru senbezonaĵajn ŝanĝojn en la lingvo, certe ne en ĝia fundamenta strukturo, sed ni ja zolas* ekzameni nian organismon kaj krei modestajn aldonaĵojn kie ni trovas mankon de esprimpovo. Tio ne estas nur rajto de la uzantaro, sed ankaŭ ĝia devo. Tiun devon jam multfoje plenumis ĉiuj gigantuloj de Esperanta literaturo ekde Zamenhof mem. La kriterioj sekvitaj de ili (kaj de ni) evidentiĝas: aldonitaj* radikoj aŭ gramatikeroj estu etimologie logikaj, kaj ili konformu al la lingva strukturo kaj komforte ensidiĝu en ĝin; alivorte, la samaj kriterioj uzitaj de Zamenhof kiam li kreis la unuajn radikojn. Tial, do, laŭ la tradicio de Esperanto, ni prezentas la sekvantan rubrikon en la JEN-Bulteno, kiu, ni esperas, estos daŭranta forumo por proponi kaj diskuti aldonojn al nia lingvo. Jen nur kelkaj el niaj ideoj: --T.R.

- ab- Sufikso, malo de "-in-", por indiki virseksecon, ekz. "ŝafabo".
- magna Granda laŭ atingiĝoj, historia graveco, ktp.; Karlo la Magna. Napoleono eble estis magna, sed certe ne (fizike) granda.
- zoli Angla "should", germana "sollen", ktp. Nun malelegante kaj malprecize tradukata per "devus"; alivorte, "Estus pli bone se mi irus; mi zolas iri." "Zoli" havas liberecon de tensoj, kiu mankas al "devus"; komparu "Mi zolis veni" kun "Mi devus esti veninta." Ne temas pri devo, sed pri pli bona elektuta* vojo; pri zolo.
- fejni Intence ŝajnigi kun celo de trompo, ekz. "Li fejniis malsanon por eviti laboron." Se li havus falsajn simptomojn, tiuj ŝajniĝus malsanon, sed ne intence; do la simptomoj, kaj la homo, ne fejniis malsanon.
- nupto La stato aŭ institucio de geedzeco. "Nuptiĝi" signifas "(ge)edziĝi".

silvo	Arbaro aŭ arbara regiono en pli preciza senco (angle "forest"). Grupo de tri palmoj en mezo de urbo estas arbaro, sed ja ne silvo.
ruro	Simile al la supra; kampara regiono precize, "La Kamparo" (angle "the country"), malurbecejo. Rura muziko ne devas origini el kampoj.
lona	Soleca, malfeliĉa pro soleco, angora pro manko de kunuloj, amikoj, ktp. Angle "lonely". Pli preciza ol "soleca". Multaj homoj ĝuas la <u>solecon</u> kaj tial ne estas <u>lonaj</u> .
ripasto	Mangĝo, en senco de mangĝtempo, mangĝ-okazo (angle "meal"). Se mi mangĝas unu vinberon tio estas mangĝo, sed ja ne ripasto.
ŝari	Uzi aŭ havi ion kune, kunlaborece; ne "dividi" sed kunhavi, kunuzi. Angle "share".
smili	Malgrimaci; montri plezuratan mienon <u>sen</u> rido, ega aŭ eta, kaj tial estas "rideti" fuŝa traduko. Angle "smile". "Rideto" prefere signifas ĝuste tion, "chuckle", malgrandan ridon.
-ez-	Sufikso por indiki lingvonomon: anglezo, francezo anstataŭ "la angla, la franca", certe malprecizaj kaj malelegantaj terminoj. "La angla" kio? Same adverbe: paroli angleze anstataŭ "paroli angle" (anglamiene? anglageste? anglavoĉe?).
-unt- kaj -ut-	Tute logikaj, sed ial ne de Zamenhof uzitaj, kondicionalaj participaj finaĵoj. La krimulo pafis al S-ro Ĝonz sed maltrafis lin; do la <u>murdunto</u> forkuris kaj la <u>murduto</u> viŝis la frunton.
La verbo "i"	Nedifinita verbo por aludi al ĵus dirita verbo: "Antaŭ ol vi eliros, balau la plankon, lavu la fenestron kaj promenigu la hundon.": "Jes, mi os!" anstataŭ "Jes, mi balaos, lavos kaj promenigos."
Rektaj, Neadjektivaj Participoj	En Esperanto, pro nia sistemo de vortfinaĵoj, verbaj participoj kiel "vidinta" devas esti adjektivoj, eĉ se ili estas verbaj adjektivoj. Tial "Mi estis vidinta lin" ne gramatike ĝustas same kiel "Mi estas bona lin" ne ĝustas; adjektivoj, eĉ verbaj, ne povas havi objekton. Tial mi proponas rektajn, verbajn formojn por kaj ĝustigi gramatike kaj simpligi la participajn tensojn: "Mi <u>vidintis</u> lin." "S-ro Ĝonz ne sciis, sed la krimulo jam <u>pafontis</u> lin." Same por pasivaj participoj: "S-ro Ĝonz <u>pafitas</u> ." "Esperanto <u>parolatas</u> ĉie."

Jen nur kelkaj ekzemploj de lingveroj kies uzado, nia opinio, multe plibonigus nian lingvon; nur kelkaj gutoj malgrandaj. Aliajn gutojn ni petas de niaj amikoj kiuj legas tiujn ĉi vortojn.



(Komento de la redaktanto pri
"Gutoj Malgrandaj")

Okazas ofte, en Esperanto kiel en la naciaj lingvoj, ke kunmetita vorto ricevas sencon iom pli precizan ol la sumon de siaj partoj. Tia preciziĝo nomiĝas "enleksikonigo" (angle, "lexicalization"). Ekzemple, ne ĉiu "black bird" (nigra birdo) estas "blackbird" (merlo); kaj ne ĉiu aro de vortoj (kiel ekz-e la artikolo "Gutoj Malgrandaj") estas vortaro. Laŭ kaj la Plena Vortaro de Esperanto kaj la Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto ("PV" kaj "PIV"), "arbaro" estas pli ol simpla grupo, aŭ simpla aro, de arboj; efektive, ĝi tradukas la anglan "forest". En Esperanto ja estas longa tradicio de sinonimoj, kies utilo estas ĉefe poezia: ekz-e, "frida" anstataŭ "malvarma". "Ruro" jam estas tia vorto: laŭ PIV, "(poezia vorto) kamparo", kaj "kamparo" difiniĝas kiel "aro de kultureblaj kampoj, rigardata kontraste kun la urbo"-- do, proksimume sama, kiel la propono de niaj Gutistoj. "Ŝajnigi" estas "enleksikoniĝinta", ĉiam difinata kiel intenca ŝajn-igo. "Nupto" jam sidas en PIV, sed bedaŭrinde kun alia signifo: "geedziĝa festo". Ankaŭ "-unt-" kaj "-ut-" estas jam elpensitaj; oni ja trovas ilin utilaj.

Same la "rektaj participoj", kiel "pafontis", estas utilaj. Sed la adjektivaj participoj estas tute akceptindaj. En la tuta hind-eŭropa familio de lingvoj-- sur kiu Esperanto ĉefe baziĝas-- kaj ankaŭ ekster ĝi, estas vortoj kiuj "partoprenas" (latine "participiunt") en la ecoj de kaj verboj kaj adjektivoj. Oni ne diras "Mi estas bona lin", ĉefe ĉar "bona" ne akceptas komplementon. Sed "utila al mi", "amiko al ĉiuj", "fremda al niaj moroj", "valora por niaj celoj" ks. aŭdiĝas ĉiutage, adjektivoj kaj eĉ substantivoj kun komplementoj. La sola diferenco ĉe la participoj estas, ke ili povas akcepti akuzativan komplementon, laŭ la uzo de la verbo. Kaj por la facileco kaj libereco de esprimado, la adjektivaj participoj estas necesaj al la lingvo.

--M.M.

A N O N C O

((Mirricevis ĉi tiun anoncon antaŭ preskaŭ jaro, de du membroj de la grupo, kiu faras ĝin. Ili ne estas Esperantistoj, sed interesiĝas pri la lingvo; la anonco eksplikas sin. Mi petas pardonon pri la malfruo.))

.....


Ni estas grupeto de homoj interesiĝantaj trovi sunan insulon, sur kiu ni povos ekevoluigi novan kulturon, kiu inkluzivos diversajn rasojn kaj religiojn. Ni celas konstrui spiritan komunumon, kies kelkcent membroj povos vivi harmonie kun si kaj kun tiu dieco, kiun ni kredas enesti en la universaleco de la homaro. Ni volas vivi proksime al la tero kaj ŝiaj fortoj, en simpla kaj ekologie ekvilibra maniero, por klopodi atingi memstarecon.

Klopodante kontribui energion al la celo de Unuopa Paca Mondo, ni esperas starigi internacian orfejon, en kiu kunigi, el la tuta mondo, infanojn suferantajn pro milito aŭ naturaj katastrofoj.

Ni interesiĝas lerni la helplingvon Esperanton por uzo en nia komunumo. Ni kredas je la principo malantaŭ ĉi tiu universala lingvo: "ke ĉiu el ni havu en sia povo tion, alparoli kaj kompreni ĉiun el siaj kun-homoj en la tuta mondo."

Iu, kiu iom ajn interesiĝas pri ĉi tiu komunumo, skribu al:

Amerushas (la nomo estas provizora)
c/o 210 Windsor Avenue
Swampscott
Massachusetts 01907.



La vinjetoj ĉerpiĝis el Alphabets and Ornaments, de Ernst Lehner, eldonita de Dover Publications, Novjorko. Iuj el la ornamaj literoj ĉerpiĝis el Letter Forms, de Frederick Lambert, el la sama firmao.